

Esperanto-socio, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 661, 1976.06.09 & 11 & 12

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En nia observado de nia Esperanto-socio kaj de ties karakterizaĵoj ni hodiaŭ parolos pri la temo « Esperanto, lingvo elektita ».

A.- Plej ofte lingvo estas socia heredaĵo. Via naskiĝo en difinita familio kaj en difinita loko antaŭdestinas vin al unu-, du- aŭ plur-lingveco. La lingvon aŭ la lingvojn, kiun aŭ kiujn vi praktikas, vi ĝenerale ne mem elektis, escepte por esperanto. La lingvoj estas heredaĵo familia, lerneja, kelkfoje religia, kultura aŭ eĉ genta.

Cl.- Mi naskiĝis en la franclingva urbo Neuchâtel en la franclingva familio Gacond : tial mi estas franclingvano kaj unulingvulo. La francan kaj nur la francan mi praktikis hejme kaj lerneje. Devige mi studis la germanan kaj la anglan, sed tiujn ĉi lingvojn mi neniam ellernis, ĉar ilin mi ne bezonis en la ĉiutaga vivo familia kaj profesia. Mia situacio estus absolute malsimila, se miaj gepatroj estus devintaj iri loĝi ekzemple en la germanlingva urbo Berno. Tiam mi aŭtomate estus trilingvulo. Hejme mi estus lerninta la francan. Kun la kamaradoj kaj en la lernejo mi estus praktikinta la svisgermanan. Kiel kultur-lingvon mi praktikus la skribgermanan. Kiel fremdlingvojn mi estus devige studinta unue la francan, mian gepatran lingvon, kaj poste la anglan, kiun mi tre verŝajne ankaŭ ne estus ellerninta. En ambaŭ situacioj, se miaj gepatroj estus elektintaj por mi klasikan orientiĝon, mi estus akirinta kelkajn sciojn pri la latina, eble pri la greka, tre verŝajne ne pri la hebrea. Kontraŭe mian apartenon al la Esperanto-socio ne decidis la aliaj, sed mi mem. La zamenhofan lingvon mi fakte ne heredis, sed elektis.

A.- Same estas por la grandega plimulto de la Esperanto-uzantoj. Ili povas uzi Esperanton, ĉar ili de si mem decidis ĝin lerni. Vi tuj rebatos, ke ekzistas esceptoj : la «denaskaj esperantistoj» kaj la infanoj, kiuj eklernis Esperanton en la lernejo. Jes, sed eĉ por «denaskaj esperantistoj» kaj por «lernejaj esperantistoj» ekzistas la ebleco forgesi la lernitaĵon. Nur la malplimulto de la infanoj lernintaj Esperanton hejme aŭ lerneje restas fidela al sia neordinara heredaĵo lingva. Nenio forgesiĝas pli rapide ol lingvo lernita en la infaneco. Tamen restos kelkaj mensaj spuroj ĉefe ideaj. Pri ili ni havos la okazon paroli en alia prelego.

Cl.- En la hodiaŭa mondo multegas la homoj, kiuj decidas ekstudi fremdan aŭ eĉ fremdajn lingvojn. Sed inter ili tre malmultaj persistas. Kaj fakte la elekteblaj lingvoj estas ege limigitaj. Ĝis nun Esperanto malofte troviĝas inter elekteblaj lingvoj sur la prospektoj de la ĉefaj perkorespondaj aŭ plenkreskulaj instrucentroj. Tial inter la personoj, kiuj decidas eklerni fremdan lingvon, raras tiuj, kiuj elektas Esperanton. Tiu ĉi elekto tre verŝajne dependas de pensmaturiĝo aŭ de hazarda kontakto kun Esperantistoj.

A.- Ni devas agnoski, ke ne multo favoras la lernadon de Esperanto. Tamen homoj pro plej diversaj kaŭzoj, kiujn ni havos la okazon analizi en alia prelego, subite eklernas ĝin. La plimulto de tiuj eklernantoj tre verŝajne ne persistos en sia strebado. Tamen kelkaj el ili restos fidelaj al Esperanto, kiun ili daŭre balbutos aŭ fine ellernos pli malpli rapide. Tio multe dependas de la lokaj cirkonstancoj. Tiuj ĉi fideluloj formas la Esperanto-socion.

Cl.- Estas tute normale, ke por la ekstera publiko la Esperanto-fenomeno aspektas kiel io nenorma, io nenormala eĉ, io enigma kaj malfacile komprenebla, io kontraŭnatura.

A.- Multaj homoj, pro plej diversaj kaŭzoj, devis proprigi al si fremdan lingvon. Sed plej ofte io videbla devigis ilin tion ĉi fari : translokiĝo, elmigrado, edziĝo povas konduki al frapaj lingvoŝanĝoj. Ankaŭ aparteno al etlingva komunumo aŭ al lingvo-minoritato estas devigo al praktikado de fremdaj lingvoj. Ĉion tion la publiko povas kompreni. Sed, ke homoj lernas kaj praktikas artefaritan lingvon, kiun preskaŭ neniu parolas, tio ŝajnas stranga afero. Kaj la klarigoj, kiujn la esperantistoj ĝenerale donas pri sia esperantisteco, ne kongruas kun la oficialaj kredoj. Je la okuloj de la observantoj, tio ĉi reliefigas la neordinarecon de la Esperanto-fenomeno.

Cl.- Asimilado de la naciaj lingvoj estas ĝenerale hereda fenomeno. Kontraŭe la lernado de Esperanto estas ĝenerale elekta fenomeno. Io en la Esperanto-fenomeno ne kongruas kun la ĝenerale observebla lingvo-fenomeno. *Naciaj lingvoj estas heredaĵo. Esperanto estas herezaĵo.*

A.- Ju pli iu sentas sin heredanto de kulturo tra la kanalo de lingvo, des pli li suspektas la esperantistojn voli detrui tiun ĉi heredaĵon lingvan. Por li la herezo Esperanta minacas la heredon tradician.

Cl.- La venontan semajnon ni vidos, kial homoj Esperantiĝas. Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !